WIKIPEDIA

Luba lingvo

La **luba lingvo** (**Ĉiluba, Cilubà**) estas bantua lingvo disvastiĝinta en la sudoriento de la Demokratia Respubliko Kongo (Kasaï Kazajo) kun pli ol 6 milionoj da parolantoj. Kun la svahila, lingala kaj la konga lingvoj ĝi apartenas al la kvar naciaj lingvoj de la Demokratia Respubliko Kongo. Ekde la mezo de la 20-a jarcento la luba trovas limigitan skriban uzon. La luba lingvo origine estas la lingvo de la luba popolo en la kazaja regiono. Intertempe la lingvon komprenas ankaŭ multaj aliaj popoloj de Kongo, ĉar ili en la ĉiutago kunvivas kun la luboj. Ili tamen konservas sian propran lingvon.

Eksteraj ligiloj

- Vortaro luba- franca (http://www.ciyem.ugent.be/)
- Centre de Recherche pour l'Instrumentalisation du Cilubà (http://cric.populus.org/)
- Ethnologue report on Tshiluba (http://www.ethnologue.com/show_language.asp?code=LUB)
- Kisa cha **Mzee Meko** kun traduko en la luba (http://www.kasala.ugent.be/index.php?id=63&type=file)



Lingvomapo de la kvar naciaj lingvoj de la Demokratia Respubliko Kongo (ekzistas pli ol 200 lokaj lingvoj).

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Luba_lingvo&oldid=5068156"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 06:56, 15 mar. 2013.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.